

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Okazos

Legokunsido reta (sept. 4, 19:30-, per Jitsi)

Oni preparolos impreson, leginte "Kiel herbo en vento", de Ranja Zafinifotsy : kresko-rakonto de malagasa virino.

Prezento de spertoj (sept. 13, 13:30- , en Esperanto-Muzeo Jokohama)

Oni prezentos sian sperton ĉi-jaran en Esperanto, por 5 ĝis 40 minutoj, kun aŭ sen helpo de komputila projekciado. I.a. ni aŭdos sperton de ĉi-jara UK.

EL NIA MUZEO

Estas bretaro por infanlibroj – esperantlingvaj bildolibroj kaj komiksoj. La bretaro kuŝas tuj apud la enireja pordo de La Esperanto-Muzeo Jokohama. La libroj devenas de Ĉinio, Eŭropo, kaj kompreneble de Japanio. Jen estas 3 japanaj libroj, en la plej supra breto, de maldekstre :

1. **Gon-Vulpo** : Vulpeto Gon petolas kun vilaĝanoj, sed tiu petolado, miskomprenite de homoj, alportas tragedian sorton al Gon... Fama japana infanrakonto.

2. **Nudpieda Gen**: Knabo Gen en urbo Hiroŝima estas trafita de la atombombo en 1945, sed li postvivas kaj spertas tragediajn sekvojn... Kontraŭatombomba komikso.

3. **Flambirdo** : Unu el la famaj komiksoserioj de Tezuka Osamu, japana koloso de komiksoj. En tiu rakonto, Flambirdo kun eterna vivo vizitas la Terglobon en la 30a jarcento.



eseo

Vivo kun bicikloj

AKIYA Hideo

Mi rakontos mian ĝisnunan vivon pri bicikloj kaj iomete pri estonta kun-bicikla vivo.

Kiam mi estis 23-jara, mi unue aĉetis biciklon por hobia. Ĝi estis la tipo de vojaĝbiciklo, aŭ "rendonneur" en la franca, kaj per ĝi mi vojaĝis en multajn lokojn tra Japanio. En someraj ferioj kaj en

jarfinaj-novjaraj ferioj mi turismis en diversaj lokoj; ekzemple la regionoj de Nanki (tra gubernioj Mie kaj Wakayama), Hokkaidō, Kyūshū (tra Miyazaki, Kagoshima, Kumamoto), Shinshū kaj Hokuriku (de Nagano al Niigata kaj Toyama), Tōhoku (tra Iwate, Akita, Aomori), ankaŭ pli proksimaj duoninsuloj de

Izu (Shizuoka) kaj Bōsō (Chiba).

Tiam mi ofte uzis la rimedon tiel nomatan "rinkō". Tio estas kunporti biciklon per trajno. Antaŭ ol eniri en la trajnstacion oni mem malmuntas sian biciklon en partojn kiel biciklo-kadro, radoj kaj aliaj pecoj, kunligas ĉiujn per ŝnuroj por enpaki ilin en rinkō-sakon, kaj prenas trajnon kune kun tiu envolvita pakaĵo. Elvagoniĝinte ĉe la celata stacio, oni elpakas kaj rekomponas la biciklon. Por transiri maron kun biciklo pramo estas utila kaj ne necesas malmunti biciklon. Mi uzis tiun rimedon kelkajn fojojn.

Tiel oni povas ŝpari tempon en la itinero. Vojaĝo per biciklo ne ĉiam estas facila, eble fizike estas eĉ peniga, sed samtempe ĝi estas tre ĝuoplena kiel turismo por junuloj. Mi multe amuziĝis ĉefe en miaj 20-aj jaroj. Poste mi kutimis ĝui bicikladon por teni sanon aŭ nur por tempopasigo kiel ciklo-promenado en la urbo aŭ sur apudriveraj biciklo-vojoj.

Mi ŝatis legi la magazinon pri bicikloj nomatan "Nova Ciklado (New Cycling)," kiu ne plu estas eldonita, bedaŭrinde. En ĝi estis aperigitaj multe da artikoloj pri mekaniko de bicikloj. Eble pro tio mi ankaŭ interesiĝis en la mekaniko. Instigite de tiaj artikoloj, iam foje mi aĉetis biciklokadron solan, kaj aparte de la kadro mi kolektis ŝatatajn biciklopecojn iom post iom kiam mi ricevis salajron. Tiamaniere, mi finfine komponis tuton de la biciklo. Tiu sperto lernigis min multe pri la mekaniko de biciklo, kaj poste mi preskaŭ neniam bezonis helpon de profesiaj mekanikistoj en riparado de bicikloj, aŭ en peco-interŝanĝado por plibonigi biciklojn.

Mi ĝuis cikloturisman, ciklopromenadon, kaj prizorgadon de bicikloj. Mi ŝatis diversajn tipojn de bicikloj. Aparte el ili vetkura biciklo allogis min plej multe. En mia historio mi posedis entute 7 biciklojn, kaj 4 el ili estas vetkur-tipaj bicikloj. Iujn biciklojn kompletigitajn mi aĉetis kaj aliajn mi mem konstruis kun ŝatataj biciklopecoj. Sed kelkajn biciklojn mi jam transdonis al miaj amikoj kaj unu al parenca junulo. Sekve, nur du biciklojn mi tenadis ĉe mi ĝis lastatempe.

Sed mi rimarkis ke dum ĉi tiu deko da jaroj mi rajdis vere malofte, eble nur kelkajn fojojn en ciklopromenado. Diverse utila aŭtomobilo igas mian vivon pli kaj pli aŭtomobil-dependa, kaj laŭ-aĝa malfortiĝo pli kaj pli igas min for de bicikloj. Mi akre sentis tion. Do, en la lasta decembro mi fine decidis forlasi la du biciklojn, kiuj daŭre okupis malgrandan spacon de la vestiblo, kaj mi forvendis ilin kune kun aliaj nenecesaj aĵoj en hejmo al brokantisto, tamen,



bedaŭrinde preskaŭ senpreze.

De tiam pasis ĉirkaŭ duonjaro. La spaco de la vestiblo fariĝis malplena; tio estas kontentiga. Sed samtempe, mi sentas ion malkontentigan en mia koro. Ŝajnas ke tie ekestas alia malplenaĵo. Ĉu ĝi estas postsopiro al bicikloj, aŭ ia nostalgio al la juneco, kiam mi estis pli vigla?

Jes. Ŝajnas prave, ke mi ankoraŭ sopiras al bicikloj, ĉar mi lastatempe emas ĝui videojn pri bicikloj en Youtube-kanaloj. Ankaŭ, mi ekbedaŭris ke mi kutimiĝis iri ĉien per aŭto, eĉ al la biblioteko, kien mi foje piediris en ĉirkaŭ 25 minutoj. Eble mi rekonas kaŝan deziron reakiri kapablon por aktiviĝi pli vigle ol nun.

Ĉu eblas revigligi min? Mi ne certas. Tamen, nun mi volas aĉeti novan biciklon kun elektra akcelado, kiu povos anstataŭi mian malsufiĉan forton. Mi deziras ke mi povu bicikli almenaŭ al la biblioteko kaj diversaj parkoj. Se mi posedos biciklon kun portilo, mi biciklos al konvenaj butikoj kaj superbazaroj por aĉetado. Nun mi surrete serĉas informojn pri taŭgaj bicikloj, kaj esperas ke mi povos fiksi kandidaton plej baldaŭ.

La 139-a Legokunsido

En la 5a de junio okazis la 139-a Legokunsido. Partoprenis 4 personoj.

Vivo kaj opinioj de Majstro M'saud - Saĝa azeno instruas nin

Mizro Iwaya

Oni povas diri ke tiu ĉi estas la sola libro de Jean Ribillard, iusence genia verkisto de Esperanto. Mi diris "oni povas" aŭ "iusence" ĉar ekzistas varia interpretado en lia vivo. Ĉiukaze mi povas diri ke tiu ĉi libro estas interesa pli ol aliaj esperantaj libroj. Mi legis ke ĝi plaĉis al Lena Karpunina kaj ŝi tre multe laŭdis ĝin. Sed samtempe mi scias ke ekzistas diversaj gustoj en esperantaj legantoj, same diversaj niveloj. La antaŭparolo de la libro diris, "Jam la eleganta stilo kaj pitoreska lingvaĵo signalis legaĵon taŭgegan por superaj kursoj, kies anoj, satnaŭzitaj de porinfana legofuraĝo, sopiras materialon konvenan al la normala plenaĝa inteligento." Jes, tia estas tiu ĉi libro!

La oratoro de la libro estas azeno, kiu naskiĝis en la dezerta regiono de Norda Afriko. Tial multaj japanoj rememoras faman libron de Nacume Soseki "Ehem, mi estas kato" kie kato, oratoro, sprite kritikis homajn agojn. Kiam la azeno naskiĝis, ĝia mastro nomis ĝin M'saud, kiu signifas "feliĉo" en araba lingvo. Ĝi estas tre saĝa azeno, kiu akre analizas diversajn fenomenojn ĉiukaŭ si. Ĝia intelekto ofte mirigas nin. Tio estas komprenebla, ĉar la aŭtoro laboris en franca armeo en Norda Afriko longtempe, kie li okupiĝis en konstruado k.a. Li certe havis sufiĉe da libera tempo kaj vidis multon kaj legis multon, kio rezultis en granda

intelekto en li. Lia intelekto respeguliĝis en la paroloj de la azeno. Temas pri tiea naturo kaj diversaj okazaĵoj precipe kaŭzitaj de malsaĝaj homoj. Legantoj povas bone lerni la moron kaj la historion de Norda Afriko. Certe M'saud estas la aŭtoro mem, kiu vidis diversajn malraciaĵojn tie.

Nun mi volas prezenti la aŭtoron. Jean Ribillard laboris longe en franca armeo en Alĝerio. Post la ekŝiĝo li revenis al Francio kaj komencis lerni Esperanton en 1948. Lia instruisto diris, ke li progresis genie rapide en Esperanto. Li jam ekverkis siajn epizodojn post kelkaj jaroj, kiuj aperis en Heroldo de Esperanto. Poste li verkis rakontojn pri azeno en "Vagado sub palmoj" en 1956. Ili kaŭzis grandan sensacion kaj li plu verkis unu volumon da libro, t.e. tiu ĉi libro. Unu alia fakto kiun mi devas menciigi estas ke li estis budhano. Detalon mi ne scias, sed li estis redaktoro de eŭropa eldono de "La Budha Lumo." Foje li montris ĉinan faman anekdoton nomatan "朝三暮四 - matene tri, vespere kvar", kie la posedanto de simioj trompis ilin per ruza kalkulo. La aŭtoro sciis eĉ tian orientan aferon leĝeran. Tia estas unu el liaj intelektaj flankoj.

Mi ne volas rekomendi tiun libron al ĉiuj esperantistoj. Sed mi volas diri ke spertaj esperantistoj bone sciu ke tia sprita verko troviĝas en esperanta literaturo.

"La lupino kaj aliaj rakontoj" de Saki

Sibayama Zyun'iti

Estis konata al mi brita novelisto, plumnome SAKI, kvankam mi ne legis lin eĉ en la japanlingva traduko. Ial mi aĉetis lian rakontaron, eble ĉar la tradukinto estis Edmund Grimley Evans, kies prelegon pri esperantlingva verkado mi aŭskultis en iu UK.

La noveliston Saki (1870-1914) mi komparu kun japana novelisto Akutagawa Ryunosuke. Akutagawa verkis novelojn kun amara fino,



ĉe la “Fadeno Aranea”, ke avarulo ne povis ĉielen supreniri — sed se Saki elektus la saman materialon, li konkursigus du avarulojn, kaj unu el ili faligus la alian kaj sola sukcesus ĉielen iri: nome la rakontoj de Saki estas kutime amara, nigre humura. Mi aŭdis, ke oni komparas Saki kun usona novelisto O. Henry. La noveloj de O. Henry estas sprita, ofte kun optimisma, homama fino. Sed mi preferas la acidecon aŭ maldolĉecon de Saki, kvankam ne ĉiuj rakontoj estis laŭ mia gusto.


Inter la 20 rakontoj en 150-paĝa libro, mi ĉekape menciis “La malripoz-kuracado”. Oni ofte rekomendas al psike tro ŝarĝita homo preni ripozon kiel kuracado. Sed al homo tro trankvile kaj kontentege vivanta, kion fari? Al tia riĉulo, hazarda kunvojaĝanto Klovizo (kiu cetere aperas en liaj pluraj noveloj) en trajno flustras; en via hejmvilaĝa domo okazos konspiro, nome oni masakros dekojn da judoj loĝantaj najbare. Kaj la riĉulo estis ege iritita; ĉio ĉi estis la falso de Klovizo, provanta malripoz-kuracadon al la pac-kapulo. Nu, tiu ĉi rakonto verkita kredeble ĉirkaŭ 1910 estus nigra ŝerco tiam, sed hodiaŭaj legantoj, kiuj konas kion Nazio faris pli ol dudek jarojn post la forpaso de Saki, sentas pli ol nigran ŝercon el la verko.

En “Rakontisto”, onklino en trajno kun du knabinoj alrakontis decajn rakontojn al la knabinoj, sed ili ne aŭskultis ŝin trankvile kaj bruas. Tiam, fraŭlo en la trajno ekrakontis: “Iam estis eta knabino kun la nomo Berta”,... “kiu estis eksterordinare bonkondata”. Do la rakontokomenco ŝajnas esti tede morala, sed... “en la ĝardenon venis lupo, Berta kaŝis sin”,... kaj en la fino, la lupo formanĝis ŝin “ĝis la lasta peceto”. La onklino protestis, sed la fraŭlo

eltrajniĝonta diris, ke per la rakonto la knabinoj estis ne bruantaj. Tio perfidas onian senton, ke bonkondata knabino iĝos feliĉa, sed iusence edukas, ke la mondo estas foje kruela.

Nu, mi malkaŝis eĉ la finon de la du rakontoj. Komparante ilin, mi trovis komunecon. La malico, nome la murdo de la judoj kaj la mortigo de la knabino, do nigraj malvirtoj, okazis nur en fikcio, kaj en la realo de la rakonto, estis feliĉo... sed oni sentas pli da impreso per la nigra malvirto, ol la feliĉa fino. Tia estas la lerto de Saki, mi opinias.

Cetere, en la kovrilo estas desegnaĵo de lupino, kaj la libro titoliĝas je “La lupino kaj aliaj rakontoj” kaj enestas rakonto “La Lupino”. Sed ĝi ne temas pri la vivo de lupino. Ĝi estas rakonto pri timo, kion homoj sentas pri horora estulo lupino.



sezonvorto julia

Glacia deserto かき氷 Okita Kazumi

Ĝi estas farita per fajne raspita glacio, sur kiu oni verŝas siropon. La plej oftaj siropaj gustoj estas de frago, melono kaj citrono.

Ĝi estas glacia dolĉaĵo, kiu sentigas la alvenon de la plej varma somera sezono.

